

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Protagonismo

“Ekzistado estas akto. Korpo — vestaĵo. Jarcento — tago.”

(El: Nia hejmo. Francisco C. Xavier _ Andreo Ludoviko)



"Ekzistado estas ago",
en sanskrito: karmo.
Ni estas neĉefaj roluloj
en teatraĵo, kiu ripetiĝas
eternece, serĉantaj
ĉiam la ĉefan rolon
por bono aŭ malbono.

Ostaĝoj
de l' sortoŝanĝoj
de sinsekvaj vivoj,
ni nur estos liberaj,
kiam ni ĉesos
ami nur tion,
en la aliulo,
kio kuŝos en ni.

Juiz de Fora, 1^o02/2020

Konfeso

Por vivi sur la planedo
plian tempodaŭron
mi surhavas korpon,
maŝinon, kiun mi regas,
sen eĉ koni ĝian findaton.

Antaŭ ol fariĝi homa,
mi estas spirito, enigmo,
kiu delonge min defias.

Mi estas besto
egoisma kaj stranga,
ema je poeziaj deliroj,
preskaŭ filozofiaj ...
kaj perdas multan tempon
kun malutilaj bagateloj,
kiuj plene havos sencon,
kiam mi revenos hejmen.

Juiz de Fora, 10/02/2020.

Eto (Ĉinio)



Jen alvenas malrapide l' primavero,
kun viveco kaj la vervo de naturo.
Varma spir' leĝere ŝvebas en aero,
oni kaptas jam la senton de plezuro.

Herboj velkaj nun verdiĝas kun espero,
florburgonoj ŝvelas en zefira lulo,
birdaj ĉirpoj klaras, molas kun tenero,
kaj insektoj trilas salte en susuro.

Persikfloroj ĵus ruĝiĝas en ventpelo,
jam invitas papiliojn al danc-balo,
kaj abelojn al farado de mielo.

Arboj strebas al ombriĉa la vualo,
la folioj pligrandiĝas en sunhelo,
kontraŭ l' suno ŝirmos homojn sur trotuaro.

Tiberio Madonna (Italio)



TRANS LA TEMPO

Mi estas vivanta
 pluan vivon
 strangan
 ekster la tempo.
 Mi estas kaŝrigardanta
 sen permeso
 tra la truo de seruro
 kiam ĉio estas finiĝinta
 kaj mi vidas
 kio okazas
 trans la limo
 post
 la frapo fatala
 mi vidas tion
 kio ne estas por mi,
 mi sentas tiel.
 Kion mi faras?
 Kion mi faras ĉi tie
 ankoraŭ ĉi tie?
 La filmo finiĝis
 la kinejo malplenas
 kial mi
 troviĝas ankoraŭ
 en la ludo
 kiu ja fine estas
 de fremdaj bildoj?
 Tamen
 ĉi tie mi restas
 trans la tempo
 mergite
 en la nenion
 kiu daŭrigas flui
 sed ne apartenas al mi.

Yanke (Ĉinio)

Mi preĝu

Mi preĝu por tiuj malfeliĉaj infektitoj,
 kiuj kuŝas silenteme sur la malsanlito,

kiuj tuttage dronas en enuo kaj sen intereso,
 kiuj estas enŝovitaj per kaŭĉukaj tuboj,
 kiuj ĉiumomente turmentiĝas de tuso kaj anhelado,
 kiuj senforte baraktas inter vivo kaj morto.
 Mi deziras, ke ili resaniĝu tre baldaŭ kaj
 vivu la normalan vivon senĝene.



Mi preĝu por tiuj ankoraŭ en bona sano,
 kiuj pasigas tagojn post la fermita pordo,
 kiuj atentigas pri la informoj de pandemio tuttage,
 kiuj enue paŝadas en ĉambro de mateno ĝis nokto.
 kiuj volus labori sur sia posteno malgraŭ epidemio,
 kiuj tag-songas pri libera flugado kiel birdoj.
 Mi deziras, ke ili pli frue eliru el la ĉelo
 kaj laboru energie kaj diligente kiel antaŭe.

Mi preĝu al tiuj laborantoj de la kvartalo,
 kiuj servas tutanime por loĝantoj enfermitaj,
 kiuj superrigardas la staton de ilia farto,
 kiuj faras aĉetojn por tiuj konatoj kaj nekonatoj,
 kiuj plenumas sian devon gardi la kvartalon,
 kiuj okupiĝas pri diversaj bagateloj por loĝantoj.
 Mi deziras, ke ili bone manĝu kaj tenu sin en bona
 sano
 kaj baldaŭ vivu kune kun siaj familianoj kiel aliaj.

Mi preĝu por tiuj kuracistoj kaj flegistinoj,
 kiuj forlasis siajn karulojn por konkeri la
 kronvirusojn,
 kiuj forgesas sian propran sekurecon por protekti
 aliajn,
 kiuj svarmas de diversaj landpartoj por unua savo,
 kiuj ĉiumomente flegas kaj kuracas la infektitojn,
 kiuj prenas alies vivon kiel gravan aferon.
 Mi deziras, ke ili bonfartu en kuraca laboro
 kaj fine supervenku la damnindajn virusojn.

Virusoj estas venenaj kaj senkompataj,
 sed la amo inter homoj sanktaj kaj senprezaj.

Hans-Georg Kaiser (Germanio)**Tombejaj anĝeloj**

Ŝtona anĝeloparo
sur la urba tombejo en Altenburg.
Unu vango de la dekstra anĝelo,
preskaŭ la tuta mentono kaj nazduono
estas misformitaj ĝis nerekonebleco.

Ĉar duono de lia buŝo ankoraŭ
ridetas kaj la bele formitaj okuloj
estas nedetrinitaj, li rigardas tiel,
kvazaŭ li volus diri al ni:
Ili disŝiris vangon de mi,
sed la bonecon en mi, la anĝelon en mi,
tiun ili ne povis disŝiri!

Tiu vetere detruata anĝelo, kiu aspektas,
kvazaŭ trafis lin grenado,
ĉirkaŭbrakas kun siaj fortaj brakoj
gardante la alian anĝelon.

Li premas disŝiritan vangon je ties kolo
kaj afable rigardas min ĉe tio
kun preskaŭ nekomprenebla optimismo,
kvazaŭ li volus diri: Rigardu do al mi,
vi, mortotima homo, ankoraŭ en mia disfalo
mi defendas lin, tiun anĝelon, kiu estas mia
frato!

La alia, la ĉirkaŭbrakata anĝelo,
tenas sian plumpiĝintan dekstran manon antaŭ
la ventro
kaj rigardas kun optimismaj okuloj en la
sunon.



Decembre de la jaro 1987

PAPOS NASCENTES (Brazilo)**Rondodanco**

rondodanc', rondodancet'
rondodanci iru ni
vidu ni: sablo revenas
vidu ja revenos ĝi



sabl'horloĝo donacita
estis vitra ravis min
mia am' al vi delonge
kreskis kaj frenezis min

pro tio kara Marli
venu tuj al nia rond'
diru verson tre amuza
diru mi ne iros for!

ĉi korpo min prezentas
min ne reprezentas ĝi
mia anim' ja reprezentas
la Spirito estu mi

pro tio mia korpo
mia anim' kaj Spirit'
diru verson kun gracio
mi sentempas tie ĉi!

SENMEMORIGITA

senvestigita de mi mem
senmemorigita
dum kiom eonoj mi vagas
de stelo al stelo
de intertempo al intertempo?

intergalaktika sen festvesto
pompo preparo mi intuas min alvokita
kvazaŭ par' kaj parto:
lemuriana plejadiana atlanta

vegao min postulas sirius' min kunvokas

senmemorigita kaj sen rumo
la stelo pola norton min ne donas
daŭre mi ruliĝas tra iluzia nokto
de mia volonta blindo:
kiu bizara popol' min liberigos
dum ekstazo diskreta?
kaj min koncedos vibre
la legitiman habeas corpus
de lumoj briloj kaj koloroj
ĉe mia kontaĝa renovigo?

Siv Burrel (Svedio)



Sonĝo

Iun nokton dum la dorm'
iras mi per milda vent'
al lando kun alia norm'
ol kutima vivevent',
— Nur pensu, kaj konstruiĝas dom'!
diras min la sonĝa hom'.
— Senlima estas vi, kiel mi!

Amikojn mi renkontis
kaj urbojn ili montris
kun bibliotekoj, koncertejoj,
parkoj kaj banejoj.
Mi ĝuis la kuneston
ĝojan, karan feston!

Resti tie volis mi
en bela sonĝosfer'.
Sed taskojn havas mi
sur nia propra ter'.
La sonĝo donas eblecon
esplori la teran belecon.

Ĉuisto (Ĉinio)



Umebloraj

viaj purblankaj petaloj en vento

flirtas kiel neĝflokaj
falantaj el la firmamento
iliaj graciaj dancmovoj
ŝajne kisas viajn ruĝajn vangojn



vi elspiris delikatan aromon
kiu varmigas la spacon inter tero kaj ĉielo
dumvive mi nur atendas ĉi tiun momenton
mi ŝvebis trans la frida valo
mi evitis la kvietan monteton
kaj mi alkroĉiĝas al via basko
alpremante min al via koro
mi volas tra la silenta brumo
kaj maldika nebulgazo
aŭskulti al la suspiro el la foro
ĝuste kiel la falantaj blankaj floroj.

Jadranka Miric (Serbio)




Januaro printempas

Nigrogriza nubaro.
De nenie Luno aperanta.
Tra malhelo Luno brilanta.
Salut' sur la pint' de Rtanj montaro!

Lante, lante mia Luno,
lumigu la vojon al la karul'
se revenus li antaŭ la Suno.
Estu li la bonŝancel'

Januara printempa tag' ...
galantoj ekflorantaj
Kia beleco, kia mag'
En vesper' birdoj flugantaj.



Elena Popova (Bulgario)



Enigmoj

Ĝi estas “ fiŝo “ saĝa –
malbonon ne faras.
Iam savas de plago
eĉ ŝipojn en la mar’.
Estas fenomeno
la

(delfeno)

Por ĉiu doloro
estas kuracherbo –
diras la proverbo.
Por ke neniu eraru,
la homoj ne serĉas
ĝin en la herbejo,
sed en la

(drogejo)

Ne enuas
en la river’
la fiŝ’ danĝera,
buŝega.
Gardu vin
de provoko
al

(ezoko)

El Ĉina Antikva Poezio

Su Shunqin (1008-1048)

Pavilono Canglang

—laŭ melodio *Preludo de akva melodio*
Pitoreskaj bordoj de la lago Taihu.
Pura kaj kvietaj Dongting-monto.
Fiŝoj kaj fiŝegoj kaŝas sin sub ondo
de la lago vasta, kiu vualitas
per nebul’ ĝis horizonto.
Kiam mi ekpensas pri lojalaj korteganoj,

tuj vidiĝas boatet’ tra akvotondo
alrapidas jen kun fiŝĉasaĵo,
spite al ŝtormpluv’ vespera, giras
ĉirkaŭ l’ sabla benk’ al hejma rondo.

Viro ambicia
devas doni lumon
kiel ardo sunradia,
honti pri nenifarado.
En la aĝ’ plenenergia
eĉ grizharoj kovras mian kapon,
marasmigas tro vizaĝo mia.
Volas mi hokfiŝi en lagakv’ frida,
sed mi timas, ke konjekto fia
de akvbirdoj pelus fiŝojn
disde mia hok’ al lok’ alia.
Mi preferas do veturi per boato
tra fragmitoj kaj spektadi silenteme
ondojn de lagakvo multvaria.

Cai Ting (1014-1079)

—laŭ melodio *Ĝoja oriolo*

Frumatene en aŭtuno
lima fortikaĵ’ kovrita jen per prujno
firme staras sub flavnuboj
en purpur-vapora la brakumo.
Antaŭ ĝi velkintaj herboj
skuiĝadas en la venta zumo.

La militĉevaloj henas kontraŭ la vento,
kaj sovaĝanseroj kriĉas kvazaŭ en lamento
sub la lun’ en aŭroronta firmamento.

Ĉe l’ nordlimo fridas la kiraso
de l’ soldatoj. Ili sin ekzercas
en skermado kaj rajdado en amasoj,
kaj kantadas trist-impone.
Ili marŝas per decidaj paŝoj
kaj ja ĵuras rekompenci l’ gracon
de l’ imperiestr’ per meritĉasoj.

Regas ĝoj’ en tuta landolima sfero,
oni jam armilojn metis en tenejon
pro pacema la situacio en espero.

La soldatoj junaj el provinco Shanxi
prenas eĉ militservadon kun fiero.

Meze de ridsonoj en interbabilo
nur sufiĉas fari mesaĝ-fajron
por informi pri pacemo kaj stabilo
jen de temp' al tempo, tiel ke l' popolo
vivas kaj laboras en trankvilo.

La monarko sankta zorgas pri l' landlimo,
kaj potenco lia lumas kun minaca brilo,
ke la malamikoj ne kuraĝas fari
agresagojn kun aroga fi-deziro.

Tamen jaroj pasas flue,
ve, jam ni garnizonistoj maljuniĝas
kaj ni povas streĉi fortojn nun ne plue.
Paco regas, kvietiĝas la landlimo.
Ni jubilu, tostu, kaj vivadu ĝue.

Sima Guang (1019-1086)

Belulino

—laŭ melodio *Luno super okcidenta rivero*

Kun loz-plektita hartubero sur verto,
ŝi portas vangojn pudre ŝminkitaj.
Flirtanta rob'el tul' sur korp-svelto
reliefigas ŝin per movoj ekscitaj,
kun paŝoj kvazaŭ filament' de necerto.

Ĉiĉoj renkontiĝ' malplias ol nenia vidiĝo,
la korinkilno ja signifas nulon de nulo.
Jen fine de muzika prezentad' ebriiĝo
forpasis, ŝi sobriĝas iom jen el vin-brulo.
Nur restas la kvieta korto en lunlum-lulo.

Wang Anshi (1021-1086)

Sopire pri antikvaĵoj en Nankino

—laŭ melodio *Aroma laŭrbranĉo*
Sur alta tureg' mi vagigas okulojn:
jen de ĉi antikva ĉefurbo la belo
de malfru-aŭtuna tempdaŭro—
iome rigora vetero;

purklare jen kiel blanksilka rubando
senĉese fluadas la mil-lio*-longa rivero;
montpintoj helverdaj rekt-staras pafsage;
en lumo de l' sun' subiranta velŝipoj
navedas jen sur flu-nivelo;
vinvendaj ŝildflagoj oblike starantaj
flirtadas en forta ventpelo;
en foro vidiĝas pentritaj boatoj
alflosas sub buntaj nuberoj;
ardeoj batsvingas flugilojn
kaj soras ĝis blua ĉielo.
La tutan vivbildon ne povas
elpentri oni laŭ reala fidelo!

Antaŭe nobeloj kaj princoj
strebadis al lukso konkure.
Tragikaj eventoj en la historio
restigis malamon kaj triston ja nure.
Tiu ĉi mil-jara ĉefurbo ja spertis
prosperon, humiligon fojplure,
neniel utilas lamenti pri ili.
Malnovaj aferoj de ses dinastioj,
ja kiel akvfluo, forfluis senspure.
Sed ekster la urbo skuiĝas
velkinta herbaro susure,
malvarma nebulo plenkovras
brilantan la verdon velure.
Ankoraŭ hodiaŭaj knabinoj
en la amuzejoj kantadas plezure
de tempo al tempo la kantojn
pri land-ruiniĝo dormlule.

*lio: tradicia ĉina mezurunuo de longo, egalanta 0.5 kilometron.

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Vinicius de Moraes

PAPILIOJ

Nigraj
Bluaj

Blankaj
 Flavaj
 Ludas
 Sublume
 Papilioj
 Ĉu ne ravaj !?
 Papilioj blankaj
 Al gajo senmankaj .
 Papilioj bluaj
 Al lumo l' unuaj .
 Kaj tiuj flavetaj
 dolĉe malkvietaj ...
 Kaj tiuj el nigra velur'
 Kia obskur' , kia obskur' !

**Vinicius de Moraes, brazila poeto, ankaŭ fajna lirikisto kadre de bosanovo ('Garota de Ipanema' kanzono kiu estas konata en esperanto kiel 'Knabino el Ipanema')*

Cecília Meireles

MOTIVO

Mi kantas laŭ l' moment' ekzistas,
 kaj mia viv' poete plenas.
 Ne ĝoja estas mi, nek tristas:
 versoj min tenas.

Ameme al kio ne daŭras
 mi iras: sen ĝu' , sen turmento.
 Tra l' tag' , tra l' nokto senbedaŭras
 mi tra la vento.

Ĉu mi renversu aŭ konstruu,
 ĉu mi restu: forta, en feblo,
 ve, kia dub' ĉu mi trapluu
 kun, sen videblo!

Mi kantas, kanti estas ĉio.
 Varmos eterne l' ritmofrapo.
 Nepre mi iam mutos, tio:
 sen ia gapo.

**Cecília Meireles: Rio-de-Janeiro, nov 7 1901 -- s.u. nov 9 1964, krom poeto ŝi estis pentristo, instruisto k. ĵurnalisto. Ŝin oni agnoskas kiel unu el la plej gravaj*

lirikistoj kadre de la portugala lingvo.

Elportualigis



Wel CR (Brazilo)

Mimoza Ahmeti



Nigula danco

Vi dancos,
 Vi dancos ĝisfine
 La soifan rondodancon.
 Je la fino de ĉiu spirita sezono
 La freneziĝintan rondodancon!

Atendu, mi ne hastos por subkompreni vin
 Donos vi rekte, direkte la ritmojn ĝiajn,
 La tamburon,
 La timigajn mantukojn kaj la vagantan
 dancistinon.

Je la fino de ĉiu spirita sezono
 Vi grimpas sur la ruĝa ebena de via koro,
 Supre, tie kie estas la granda stako de la ostoj
 blankaj
 de tiuj viroj sklavigantaj vin.

Mortintaj,
 Mortintaj estas ili por vi, tie supre,
 Pro tiu severa leĝo,
 Pro tiu antikva kaj sovaĝa rito,
 Daŭre rompanta kaj detruanta kelkajn virojn
 rarajn,
 Por sekigi la ties gorĝon,
 Por disostigi la koron,
 Por perforti la celon,
 Por grasigi la ambicion,
 Por fari la volupton per knabina korpo,
 Por fari la krimon per virina vizaĝo.

Kaj vi, pro rabieco, dancas ĉi tiun
 rondodancon venĝeman,
 Per la fortaj mantukoj de la ties ostoj

La nigran riton estas vi konstruaŭstarinta...
 Per la mantukoj de la ties skapoloj
 Vi turniĝas en la aero.
 Sur la zono pendas kaj sonoras
 La iliaj blankaj membroj.

Kaj ĉi tio estas la pratempa rito,
 ekde du mil jaroj, la tamburo:
 Dang- krup- ting- tang! La rondodanco
 performita
 Je la fino de ĉiu spirita sezono,
 De vi, animo.



La okuloj de vizaĝo

Knabino venas kvazaŭ vento, anhelanta, pura
 pulsanta, malkvietiga, turbule klara
 Ŝi atendas sin konfesi senpacienca
 Kiel tion faras la aŭroro al la monto,
 Pentas ŝi, supozas ke ĝenas min. Ne konas
 La virinan deziron por revidi la vivon
 En knabina vivo.
 Mian hieraŭon ja travivas en la koloroj de la
 hodiaŭo
 ŝia
 Simetrio de la praktiko estas ja la vero,
 Ambaŭ niaj vivoj kiel la okuloj de vizaĝo
 similas.
 Mian sperton en ŝia voĉo mi aŭdas,
 baraktante...

Ne sciis mi ke la vundoj per la vundoj kareseblas
 Kaj ke incizurojn ja deziras la incizuroj.
 Komprenas mi hodiaŭ ke la mondo ĉe ŝi
 ririveligis:
 Marsanoj, lunanoj, lazuraj jupiteranoj
 En mia hejmo ŝi alportas,
 Venas,

Alveni jam komencas...

Elalbanigis



Bardhyl Senimi

(Albanio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-UNUA

Tian Zifang

§21-04

Kiam Konfuceo iris vidi Laŭzi, tiu ĵus lavis sian hararon, kiu pendis sur liaj ŝultroj por sekiĝi. Starante senmove, Laŭzi aspektis kiel senviva korpo. Por ne ĝeni lin, Konfuceo retiriĝis kaj atendis. Post iom da tempo li vidis Laŭzi kaj diris:

“Ĉu mi estas blindumita aŭ ĉu tio estas vera? Ĵus vi staris senmove kiel sekiĝinta arbo, kvazaŭ vi forĵetus ĉion en la mondo kaj, en kompleta izoliteco, estis tute for de ĉiuj aliaj homoj.”

“Mia menso tiam vagadis en la Taŭo, la ĥaosa stato antaŭ la estiĝo de ĉiuj estaĵoj,” diris Laŭzi.

“Kion do vi volas diri per tio?” demandis Konfuceo.

“Mia menso estas tiel konfuza,” respondis Laŭzi, “ke ĝi ne povas scii, kaj mia lango estas tiel rigiĝinta, ke ĝi ne povas paroli, sed mi penas doni al vi proksimuman ideon. La jino en sia plej alta formo estas la malvarma vitala energio, dum la jango en sia plej alta formo estas la varma vitala energio. La malvarma vitala energio venas el la ĉielo, dum la varma vitala energio venas el la tero. La interagado kaj la ekvilibro de la du formoj de la vitala energio naskas ĉiujn estaĵojn en la mondo. Kiu ajn faras ĉi tiun miraklon, estas nevidebla. Ekzistas vivo kaj morto, pleneco kaj malpleneco, lumo kaj mallumo. Ĉio ŝanĝiĝas tagon post tago, monaton post monato. Io plenumiĝas en ĉiu tago, sed neniam plenumiĝo estas perceptebla. La vivo havas sian originon kaj la morto

havas sian destinton. La komenco kaj la fino sin sekvas senĉese, kaj neniuj scias la lastan finon. Se ne estus la Taŭo, kiu do estus la farinto de tiaj mirakloj?”

“Ĉu vi povus diri al mi,” demandis Konfuceo, “kiel via menso vagadas en la granda Taŭo?”

“Tiu, kies menso vagadas en la granda Taŭo,” respondis Laŭzi, “jam atingis la perfektan belon kaj perfektan ĝojon. Tiu, kiu jam atingis la perfektan belon kaj vagadas en la perfekta ĝojo, estas perfekta homo.”

“Ĉu vi povus diri al mi ion pri la perfekta belo kaj la perfekta ĝojo?” demandis Konfuceo.

“La kvarpieduloj, kiuj nutras sin per herboj, ne donas atenton al la ŝanĝiĝo de la marĉejo,” daŭrigis Laŭzi. “La akvaj insektoj ne donas atenton al la ŝanĝiĝo de la lageto. Ili ne suferas pro malgrandaj ŝanĝiĝoj, ĉar la bazaj kondiĉoj restas la samaj. La ĝojo aŭ la kolero, la malĝojo aŭ la plezuro, tute ne penetras en la koron. La mondo estas la loko, kie konekzistas ĉiuj estaĵoj. Dividante la saman mondon kaj identigante sin kiel “unu” kaj la samon, ĉiuj estaĵoj rigardas siajn membrojn kaj korpon kiel polvojn de la tero. La sinsekvo de la vivo kaj la morto, aŭ de la komenco kaj la fino, estas rigardataj nur kiel alternado de la tago kaj la nokto. Eĉ tiaj estaĵoj ne povas malkvietigi la menson, por ne paroli pri la bagateloj kiel gajno kaj perdo, feliĉo aŭ malfeliĉo. Tiu, kiu forĵetas siajn rangon kaj riĉaĵojn kiel ion senutilan, scias, ke lia vivo estas pli grava ol la rango kaj la riĉaĵoj. Se li alte ŝatas sian vivon kaj ĉiam sekvas la ŝanĝiĝojn, kiuj estas senfinaj, kio do povus esti por li maltrankviliga? Tiu, kiu atingis la Taŭon, komprenas tiun ĉi veron.”

“Majstro,” diris Konfuceo, “kun la virto, kiu povas esti egala al la ĉielo kaj la tero, vi ankoraŭ kulturis vian menson per tiuj ĉi perfektaj diroj. Kiu el la antikvaj saĝuloj povis esti sen tia sinkulturado?”

“Ne, ne estas tiel,” diris Laŭzi. “La travidebleco de la akvo rezultas ne el interfero, sed el sia natura kvalito. La virto de la perfekta homo rezultas ne el la sinkulturado, sed el la universala Taŭo. Tiel estas ankaŭ kun la ĉielo, kiu mem estas alta, kaj kun la tero, kiu estas mem estas dika, kaj kun la suno kaj la luno, kiuj mem estas brilaj. Kian sinkulturadon do ili

bezonus?”

Poste Konfuceo eliris kaj diris al Yan Hui:

“Koncerne mian komprenon pri la Taŭo, mi estas ne pli ol insekteto en vinagrujo! Se la instruoj de la majstro ne malfermus miajn okulojn, mi restus senscia pri la grandiozececo de tiu ĉi mondo.”

§21-05

Kiam Zhuangzi vizitis la dukon Ai de la regno Lu, tiu diris:

“En la regno Lu troviĝas multaj konfuceanoj, sed tiuj, kiuj sekvas vian doktrinon estas tre malmultaj.

“Ne multaj estas la konfuceanoj en la regno Lu,” diris Zhuangzi.

“Kiel do vi povas tiel paroli,” demandis la duko, “dum preskaŭ ĉiuj homoj portas la kostumon de konfuceanoj en mia regno?”

“Mi aŭdis,” diris Zhuangzi, “ke la konfuceanoj, kiuj portas rondan ĉapon, konas la periodojn de la ĉielo, kaj ke la konfuceanoj, kiuj portas kvadratajn ŝuojn, konas la dispoziciojn de la tero, kaj ke la konfuceanoj, kiuj portas jadpendaĵojn kunligitajn per koloraj silkaj rubandoj, scias ĝuste juĝi la aferojn, kiuj sin prezentas. Sed, por diri la veron, tiuj konfuceanoj, kiuj vere posedas tiujn kapablecojn, ne nepre portas la kostumon, dume tiuj, kiuj portas la kostumon, ne nepre havas tiajn kapablecojn. Vi ne konsentas kun mi? Nu, kial do vi ne donas dekreton al la regno, dirante: ‘Tiuj, kiuj portas la konfuceanan kostumon kaj tamen ne havas la kapablecojn postulatajn, estos kondamnitaj al morto?’”

Kaj la duko vere publikigis tian dekreton. Post kvin tagoj neniuj plu kuraĝis porti la konfuceanan kostumon en la regno Lu. Nur unu viro vestita en tia kostumo aperis antaŭ la palaco pordego de la duko Ai. La duko tuj vokis lin al si kaj pridemandis lin pri regnaj aferoj. Kia ajn demando estis metita, li donis pretan respondon kun abundo da detaloj kaj subtilaĵoj.

“En la tuta regno,” konkludis Zhuangzi, “estas nur unu konfuceano. Kiel do vi povas diri, ke troviĝas multaj?”

Elĉinigiis



Wang Chongfang (Ĉinio)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinio)

Kie estas la kato?

el rakontoj pri Afanti
—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Afanti
portis ĝinojn tri
da viando hejmen kaj
petis l' edzinon el ĝi
fari ja al li

pasteĉojn.
Sed lia edzin'
fritis la viandpecojn
kaj manĝis per elimin'
jen sen ajna tim'.

Kiam li
volis plezure
manĝi pasteĉojn kaj ŝi
donis nudelojn nure.
Do, li postule

demandis:
“Kie la viand'?”
“Kiam mi knedis paston,
la kat' ĝin manĝis kun frand'.
For ĉiom da kvant'!”

Afanti
tuj iris al kat',
ĝin kaptis kaj pesis ĝin
sur pesilon sen kompat'
malgraŭ ĝia grat'.

Ĝi pezis
ĝuste ĝinojn tri.
Li turnis sin al ŝi kaj
diris: “Mia kara, ĝi

pezas jen nek pli

nek malpli
tiome vere
kiom kruda viando.
Haha, kiel kruele!
Se mi severe

kalkulu,
kie 'stas la kat',
kiam viando pezas
same kiel ĝi en sat'
jen laŭ via ŝat'?”

Jadranka Miric (Serbio)

Sonoriloj sonas triste en Montenegro

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Al serboj:
leviĝu popol'
pro paca infaneco,
pro la digno de popol'.
venas ĝusta rol'.

Tre longe
daŭras malbono.
De post tridek da jaroj
pli gravas dia sono
ol krimomono.

Mensogoj
regas en la mond'.
Veron oni aĉetas.
Pro tio fariĝis rond'
de la homa ond'.

Surprize
okazis popol'!
Vekiĝis digno en ni.
Unuiĝo antaŭ ol.
Feru popol'!

Pilgrimas
 la serba fratar'
 Dio savu nin. Amen!
 Defendado de sanktar'
 kune kun pastrar'.

Novaj provokoj al homaro

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Griznuboj
 krozas sub ĉiel'.
 Jen, blankiĝis nubetoj.
 Dume videblas tiel
 bela flava stel'.

Printempaj
 revenis birdoj.
 Sunaj teneraj kisoj
 sur ĝiaj plumoj.

Herbejo
 jam verdiĝis. Ve.
 Baldaŭ ĉio frostĝis.
 Pro klimat-ŝanĝo vere
 timis homoj tre.

Vetera
 vintra tempeso.
 Daŭris mallonge. Iu
 zorgis pri sia besto
 aŭ pri domnesto.

Fajregoj,
 poste inundoj
 iĝis teuraj bildoj.
 Kvankam multoblas laŭdoj
 ol fi faradoj.

**Sopir-al-sudo* (ĉine: *Yijiangnan*): ĉina fiksforma
 poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo

xa,xa,a (x=senrima).

Mandio (Ĉinio)

Spektado al sunleviĝo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Sur
 monto vento kun susur'
 alblovas
 en rapida kur'.

Ni
 sunleviĝon kun radi'
 atendas
 nokte en anksi'.

Kor'
 nia jen al tiu hor'
 sopiras
 ĉe bela aŭror'.

Jen
 aperas luma faden'
 subtila
 de frua maten'.

Kri'
 subite elas el mi
 akuta
 kvazaŭ sen konsci'.

Ĉe
 horizont' ekbrilas tre
 la lum' je
 malluma pere'.

Stri'
 da ruĝo elsaltas pli
 el nuboj
 ŝajne kun magi'.

Sun'
 arka en nebul-brakum'
 gravedas

je orbrilo nun.

Tuj
suno sin levas sen sku'
el brumo
kaj elas ĝojbru'.

Ĝis
nun la sunlumo per kis'
karezas
la teron en briz'.

**Deskses-Silabo: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Lin Qingxuan



Granda aŭ malgranda

Amiko parolis pri la onklo de sia parenco, kiu neniam portis laŭmezurajn ŝuojn en sia tuta vivo. Ŝi ofte iris tien kaj tien surhavante grandegajn ŝuojn.

Se la gefiloj kaj genepoj demandis ŝin pri tio, ŝi diris: "Se grandaj kaj malgrandaj ŝuoj havas la saman prezon, kial ni ne aĉetu la grandajn?"

Ĉiufoje kiam mi rerakontas la historion, iuj homoj preskaŭ sufokiĝas de ridego.

Fakte en la vivo ni povas vidi multajn tiajn onklojn: verkistoj, kiuj ne havas riĉajn ideojn, insistas verki pezajn kaj amarajn verkojn; pentristoj, kiuj ne havas tiom da materialoj, pentras superbajn pentraĵojn; politikistoj kaj komercistoj, kiuj malofte restas hejme, posedas grandegajn domojn.

Multaj homoj senĉese ĉasas grandecon, sed fakte ili estas pelataj nur de interna avido, kvazaŭ ili aĉetus ekstreme grandajn ŝuojn ignorante la mezuron de siaj piedoj.

Kelkfoje malfacilas diri klare, ke malgrandeco havas sian mirindecon. Ekzemple la naciaj trezoroj, kiaj ebura pilketo, jada brasiko kaj viandpec-simila ŝtono de la Imperiestra Palaco, ĉiuj estas pli malgrandaj ol ni povas imagi.

Kompreneble, estas egale, kiajn ŝuojn ni aĉetas, se ili bone sidas al niaj piedoj, tio tre gravas. Kion ajn

ni ĉasas, ni ne devas fari tion troe.

Kelkaj songoj de juneco

Kiam ni estis junaj, ni ĉiuj havis multajn dezirojn. La artikolo *Mia Deziro*, kiun ni skribis en la klaso, ne estis vera, sed uzita por trompe kontentigi la instruistojn. Alie, ne tiel multaj homoj volus esti instruistoj, flegistinoj aŭ sociaj laboristoj.

Iu amiko ĵus fariĝis instruisto kaj instruas la ĉinan lingvon en la dua grado. La temo, kiun ŝi donis al siaj lernantoj por ese-skribado, ĝuste estas *Mia Deziro*. Iu knabo skribis en sia kajero, ke lia deziro estas fariĝi hundo. Ŝi preskaŭ svenis de kolero, lamentante, ke la infanoj de ĉi tiu generacio estas tro malprogresemaĵ.

Se ŝi estus leginta la majstroverkon *La Vivo de Hundo* de Peter Mayle, ŝi eble ne plu malestimus la deziron de la knabo. La aŭtoro rigardas la homan mondon el la vido de sia amata hundo Boy, kaj prezentas multajn signifoplenajn kaj filozofiecajn pensojn.

Mi jam ne memoras la dezirojn, kiujn mi faris. Unu jaron mi renkontiĝis kun miaj malnovaj samklasanoj. Iuj el ili jam edziniĝis, aliaj daŭre studis, kaj triaj klopodadis tien kaj ĉi tien por laboro. Ŝajnas, ke iliaj junaj deziroj ne estas tiaj.

Iuj tre ŝatas danci kaj deziras esti dancistoj. Kaj aliaj aspiras esti sportistoj.

Kelkaj songoj en nia juneco jam transformiĝis en banalan vivon.

Iam ni fiere opiniis, ke ni estas la plej elstaraj, sed kiam ni elkreskis, ni trovis, ke ni ne estas tiel bonaj kiel aliaj, do ni tute konfuziĝis. Iun tagon, ni fine konstatis, ke homoj devas kompari sin kun sia hieraŭa memo, sed ne kun iu alia. Ĉiuj songoj estas por remaĉi, sed ne nepre por realigi.

elĉinigi



Jatina (Ĉinio)

Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Retadreso: vejdo@163.com

www.elferno.cn/penlisto.htm